# ESPERO KATOLIKA

*monata revuo fondita en 1903*

JARKOLEKTO 68 n. 620

n.ro 9 Septembro 1971

# ESPERO KATOLIKA

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

Redaktoro: Sac. Felice Ruaro
37010 Costermano - Verona (Italujo)

Respondeca Komisiono: Longoni, Flammer, Scherer

Eldonejo: Fiamma del S. Cuore - Vicolo S. Antonio 2 - I - 10023 CHIERI (TO)
Tel. 942758 - c.c.p. 2/837

## Estraro de IKUE:

Prezidanto: pastro Ferdinando Longoni
via S. Ambrogio, 2 - I-20051 Limbiate (MI) - Italujo

Vic-Prezidanto: S-ro N. W. Vigar
28 Franklands Drive - Addlestone - Surrey - Anglujo

Sekretario-kasisto: S-ro Paul Scherer-Graber
Erlenstr. 58 - CH 6020 Emmenbrücke (LU) - Svislando

Vic-Sekretario: pastro Wilhelm Flammer
Zürchermühle - CH 9106 Urnäsch - Svislando

Konsilantoj:

pastro A. Beckers - Kwaadmechelen - Belgujo
patro Lovro Kiŝ, ofm, Ŝetaliŝte 2 - 56236 ILOK - Jugoslavio
s-ro Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9 - A-1030 WIEN - Aŭstrujo
f-ino prof.ino Corry van Kleef - Koewijzend 28, BLOKKER - Nederlando
s-ro Miloslav Ŝvàĉek - Penĉice 16, okr. Prerov - Ĉeĥoslovakujo
s-ro Aleŝ Berka - Na harazi 1423 Vsetìn - Ĉeĥoslovakujo
patro Manuel Casanoves, Lauria 5 - Barcelona 10 - Hispanujo

Centra Oficejo kaj Arkivo: ĉe la Vic-Sekretario, Flammer

**Rajtigo de la tribunalo de Milano n. 208 (27 majo 1971)**

**Respondeca direktoro: Longoni Ferdinando**
**Via s. Ambrogio 2 - Tel. 9960050 - I - 20051 Limbiate (MI)**

**Presejo: Soc. Tipo-litografica G. e M. Bigliardi - Via Tana 18 - I - 10023 Chieri (TO)**

**Ekspedo per poŝtabono - Gr. III/70 - Supplemento al n. 10 de « Lungo la via »**

## METODO DE LA DIALOGO.

Ĝenerale la dialogo havas multajn faktorojn, kiuj povas esti samtempaj aŭ ne: la interŝanĝon de la ideoj, la komparon de la ideoj (per kiu la partoprenantoj reliefigas la diferencojn, la komunajn punktojn kaj kunvenon de la ekspoziitaj ideoj), la serĉon per diskutado kaj pripensado, la lumigon de neobservitaj aspektoj...

Aparte, koncerne la ekumenan dialogon, ni devas atenti la sekvontajn punktojn:

Ambaŭ la partoj, komencante de sia kono de la revelaciita mistero, klopodu malkovri, estimi, serioze konsideri ĉion, kio aŭtentike valoras en la alia parto. Tiu ĉi inventaro povas daŭri longtempe.

Oni indikas iujn orientpunktojn por la serĉo:

1) veroj komune akceptitaj;

2) veroj forgesitaj ĉe alia komuno pro rilatrompoj kaj historiaj faktoroj, sed kiuj povas esti pli bone konservataj kaj maiam disvolvataj en alia komuno;

3) ĝustaj religiaj intuicioj, validaj teologiaj intencoj ankaŭ sur la zonoj de diferenco, apartaj kultaj formoj, ktp.

Ambaŭ la partoj klopodu ekspozicii la doktrinon de sia komunaĵo per konstrua formo, eliminante la tendencon al ĉiama opozicio, kiu ĝenerale kreskigus kaj pliakrigus iujn poziciojn.

La partoj sekvigos kune laboron de konstrua sintezo, tiel ke oni povos utiligi ĉiun legitiman alporton dum la komuna studo kaj serĉo.

Tiu serĉo postulas, ke oni revenu al la kristanaj originoj antaŭ la malkontentoj kaj rompoj, kaj ke oni kunlaboru serioze por atingi la solvon de la diferencoj.

Iom post iom la ekumena dialogo malfermas al la interparolantoj novajn perspektivojn, gvidas ilin al pli profunda esplorado, komencante de la punktoj de konsento.

« Serĉi por trovi, trovi por serĉi ankoraŭ », diris Sankta Aŭgustino. Pro tiu frata dialogo ili estos kondukataj al pli evidenta manifestado de la « nesondeblaj riĉecoj de Kristo ».

F. R.

## KION FARAS HODIAŬ LA EKLEZIO?

La demando: « Kion faras hodiaŭ la Eklezio? » estas ja tre komuna kaj disvastiĝanta en kritikan kaj pretendeman streĉecon. La kaŭzantaj okazoj estas multnombraj kaj diversaj. Jen kelkaj, kiuj konsideras la Eklezion nur laŭ ĝia dia vidpunkto, pretendante ke ĝi zorge enfermu sin mem en la sekreto de sia intima vivo sen neniu ajn publika kaj socia reflekto. Jen aliaj, kiuj sin adresas al la Eklezio nete apartigante la humanecon de la dieco kaj la sanktecon de la humaneco, tujege pretaj alskribi al ĝi historiajn respondecon kaj interrespondecon, kiam la humaneco, ne plu direktata al Dio kaj de Li subtenata, malnobligas kaj sin misformas. Kaj vere strange estas ke la unuaj kaj la aliaj finas en detruanta kulpiga parolado. Estas ankoraŭ iu ĉiam fervore preta ekvidi en la Eklezio akuzajn kaj denuncajn motivojn; konsideri ĝin pli kiel patrinaĉo ol patrino. La Eklezio ŝajnas la laŭvice imputato. Kion faras hodiaŭ la Eklezio?, sin demandas la liberulo zorge klopodante malhelpi al ĝi ĉiun publikan aktivecon, ĉiun socian influon sur la lernejon kaj la kulturon, atente okupiĝanta konsideri ĝin, patronisme, al la homa kaj socia servoj, kiel simpla kuratorino, sen konkretaj kaj realaj aŭtoritato kaj sendependeco. Ja, la Eklezio devus interveni por sanigi konfliktojn, kvietigi tumultojn, malaperigi revoluciojn, sed, dume, oni malhelpas al ĝi ĉiun efikon en la kulturaj kaj sociaj strukturoj. Klare elmontriĝas iu nedifinita agnosko de Dio kaj de « unu ajn Kristo », laŭ la dirmaniero de De Maistre, al la servo de ideologioj kaj interesoj de homoj kaj institucioj, sed ne de homoj kaj institucioj al la servo de Dio kaj de Kristo.

* * *

La Eklezio estas konsiderata kiel filantropia kaj antaŭzorga instituto, centro de moralaj indikoj, sed en oleografa maniero, laŭ historia prestiĝo de reprezentado, sed ne kiel dia kaj humana societo depongardanta kaj administranta la Dian Savon.

* * *

Kion faras hodiaŭ la Eklezio sin demandas la marksisto, kiu juĝas la religion kiel rezulto de ekonomia frenezo, supertiĉa fenomeno,

malhelpo al la dialektiko de la progreso. Kaj la denunco ĝuste devenas de kiuj fortranĉas ĉe la radiko ĉiun moralan kaj religian postulojn, ankaŭ se laŭ natura ordo; de kiuj konsideras, kun acida kaj koroda venĝemo, la saktajn instituciojn, la religiajn personojn. La Eklezio estas kontraŭstarata kaj denuncata. Oni persekutas ĝin kaj malhelpas al ĝi ĉiun spiritan aktivecon, nombrante samtempe diversajn sociajn akuzojn. Principoj kaj asertoj, atestoj kaj faktoj, estas lertege ekspluatataj, polemike, laŭ utilcela ludo. Kaj ĉio ĉi kun tiaj ipokrito kaj trompego, kiuj reflektas ne nur materialan koncepton, sed kontraŭteologian kaj kontraŭklerikalan malamon, kiujn la ĉiutaga kroniko pli kaj pli sentebligas kaj evidentigas.

Kion faras hodiaŭ la Eklezio?, sin demandas kun duonkaŝita malfido la politikanta kristano, kiu ne sukcesas vivi integrale la kredon de sia bapto. Li certe ne pripensas, ke la Eklezio ne estas abstraktaĵo, sed konkreta societo al kiu li apartenas kaj kies respondeca filo li estas. Mondumigita, laikigita, li perdis ĉiun personan kaj socian senton postulatajn de la kristana devo. Sin fordoninta al mezaranĝoj kaj kompromisoj, malfidela al sia misio, li konsideras la Eklezion nur simpla konstruaĵo, en kiu pasigi siajn pliajn horojn.

* * *

Kion faras hodiaŭ la Eklezio?, sin demandas la ĉiusemajna kronikisto, ĉiam inklina kritiki, konigi malbonaĵojn, postuli receptojn. Li vidas kaj registras nur ŝuldojn, imputojn, kaj duonkudras nur kverelojn. Li opinias, ke li estas tute libera, sed efektive estas submetita al la intrigoj de morala kaj religia malŝuldiĝo. Li apelacias al la kredaj principoj, sed tute ne aplikas ilin, lerte manovrante por ŝuprenaĝi ĉiam preta pli favori sian propran intereson ol tiujn de la vero.

Ne estas do tiel grava la demando: kion faras hodiaŭ la Eklezio?, kiel dokumenti kion ĝi faris kaj daŭre faras. Ŝajnas nun al ni, ja, la tempo por kantonmenti akuzojn kaj denuncojn, kaj atentigi pri la pozitivaj valoroj kaj la konkretaj realaĵoj. Oni ne fermu la okulojn registrante ĝian alistadon. Oni ekvidos, ke la Eklezio ĉeestas, en la efiko de ĝia patrineco, ankaŭ tie, kie ĝi ŝajnas forestanta: por antaŭgardi, defendi, protekti ĉion, kio efike subtenas kaj plibonigas la tutan humanan aktivecon, laŭ la ordo de la vera progreso, materia kaj spirita.

PROF. NORMA DELL'ARINGA

# LETERO DE SACERDOTO AL LA DIREKTORO DE « VITA PASTORALE ».

Tre respektinda direktoro!

Se oni rigardas la religian kaj moralan sintenon de multaj kristanoj, oni devas esti tre maltrankvila. Ĉe ni 99 elcentoj estas baptitaj, sed ĉu tio utilas la 60% da baptitoj, kiuj ne vivas laŭ sia religio kaj akceptas ankoraŭ simplan kaj senvaloran jarcentan tradicion?

ĉu tio utilas la 40% kiuj klopodas vivi laŭ religiaj principoj?

ĉu la sinteno de multaj kristanoj ne malhelpas la fidelecon al la religio?

Kiun utilon donas administri la bapton al gefiloj de ne kredantaj gepatroj? Kiun signifon povas havi la kandelo ekbruligita de la paska kandelego en la mano de la patro, se la lumo de lia fido estingiĝis? Mi pensas ke la pastroj havas grandajn kulpojn...

*Respondo:*

Bedaŭrinde multaj fideluloj lasis ĉiun religian praktikon kaj deklaras sin ateistoj je ĉiuj efektoj aŭ kontentiĝas per iu religia ago, kiu estas pli superstiĉo aŭ socia konveno ol vera kulto de Dio.

La kaŭzoj estas multaj kaj mi pensas, ke neniu enketo povus doni plenan kaj precizan kadron. Sendube iom da kulpo havas ni pastroj, se estas vere ke la popolo similas siajn sacerdotojn. Sed verŝajne la precipa kulpo de la pastroj estas tio: ili atentis troe la statistikojn kaj kontentiĝis per la granda nombro. Ni estas niaflanke konvinkitaj, ke la fenomeno de la kreskanta senreligio devus inciti nin demandi sincere kion ni faras por ŝanĝi tiun ĉi malfeliĉan situacion.

Ni ne skribis kaj ne parolis pri la renoviĝo de la paŝtista agado kiel ni skribis kaj parolis pri la konveneco aŭ nekonveneco de la sacerdota fraŭleco, pri la limoj de la aŭtoritato, pri la obeo laŭ la novaj vidpunktoj. Eble ni ne zorgis renovigi nian predikadon kiel ni zorgis renovigi nian veston.

Ĉiu partio, kiu vidas malpliiĝi la nombron de ĝiaj aliĝintoj, diras ke jam venis la tempo de serioza agado. La pastraro ne estas partio, sed pro tio ke ĝi estas multe pli ol politika partio kaj havas grandan kaj nesubstitueblan mision, ĝi devas senti la bezonon klopodi serioze por ke ĝia agado fariĝu efika. Kaj ni estos pli efikaj, se ni estos pli bonaj, se ni estos aŭtentikaj sacerdotoj, se ni estos vere « homoj de Dio », homoj kiuj vivas en plena unuiĝo kun Dio.

Alie la plej modernaj metodoj kaj la plej vigla agado estos senefikaj.

# ESTI

Mi havis la okazon ekkoni Vinoba'n, la indon kiu, apogante sin al la vorto de Kristo: « Amu vian proksimulon kiel vin mem », sukcesis fondi kaj disvastigi movadon inter dekoj da milionoj da homoj en Indujo, kiuj disdonas inter si la grundojn.

Sed precipe interesas nin lia figuro, kiu memorigis al mi la patriarkon Athenagora.

Vinoba ne malpravas diri: antaŭ ĉio gravas « esti ». Por li « esti » signifas « esti dia ». Vinoba devas esti plena de Dio, se tiel multaj homoj alkuras al li dezirante vidi vivantan sanktecon, kiun ne estas facile nei.

Lia stari, lia moviĝi, liaj plej simplaj kaj malgrandaj agoj, lia silento mem parolas pli ol liaj paroloj. La vizaĝoj, kiuj ĉirkaŭas lin, esprimas internan kaj silentan ĝojon, reflekton de lia spirita riĉeco. Similajn vizagojn mi observis en la personoj ĉirkaŭantaj Athenagora'n, kiuj ofte eliras el lia laborĉambro plene kortuŝitaj kaj kun larmoplenaj okuloj.

Ambaŭ, Vinoba kaj Athenagora, estas tre proksimaj al la homoj, al ĉiu homo, tamen oni ekrimarkas tuj ke ili vivas trans tiu ĉi mondo. Ne estas nur vortoj.

Tia « esti » impresas kaj altiras ĉiun kristanon, kiu havas la okazon renkontiĝi kun tiaj homoj. Oni estas incitata imiti tiel altvaloran realecon. Kiu konas la vojon de la sankteco sentas la bezonon reveni pasie al la asketiko, kiun ĝi postulas: vivi en Dio dum la momento de la vivo. Tiam nia vivo ne estas plu nur ekzisti, sed plene esti, ĉar Dio – la estaĵo kiu plene estas – estas en ĝi.

Tia vivo decas la kristanon, reale filon de Dio.

El tio sekvas, ke la vivo povas esti senĉesa parolado, senĉesa instruado, ankaŭ kiam oni vivas en la plej profunda silento.

Bela estas la formulo de Vinoba: M2A, t.e. dufoje mediti, unufoje agi. Impresas tio: ke ni parolas pri du personoj de la nuntempa mondo, en kiu la agado fariĝis mito.

Tio donas al ni grandan esperon.

KLARA LUBICH

## SALUTO DE LA NOVA REDAKTORO

**Karaj gelegantoj,**

mi prezentas min al vi kun miaj plej koraj salutoj. Kiam mi sendis la gratulojn al la nova Prezidanto de IKUE, mi skribis, ke mi estas preta helpi lin ĉu tradukante, ĉu sendante kelkan artikolon.
Pastro Longoni, kiu jam serĉis redaktoron en Norditalujo, esprimis al mi la deziron, ke mi bonvolu akcepti la taskon de redaktoro aŭ almenaŭ serĉi taŭgan redaktoron.
Mi montris, koncerne min, iujn malfacilaĵojn: la tasko estus tute nova por mi; mi estas parohestro; plue mi instruas kaj korespondas kun



**La nova redaktoro sac. Felice Natale Ruaro.**
**Li naskiĝis en Schio (Vicenza) je la Kristnasko 1920 kaj pro tio estis nomita Felice Natale.**
**Li studis en Verona, kie sacerdotiĝis en la jaro 1943.**
**De la jaro 1943 ĝis 1965 li instruis la lingvojn italan, latinan kaj grekan en la gimnazio de la Episkopa Seminario de Verona; intertempe li estis direktoro de la malgranda pilgrimloko « Madonna della Salute » apud Verona.**
**Ek de la jaro 1965 li estas parohestro de Costermano, kie li havas ankaŭ la taskon prizorgi la korespondadon kun familianoj de la 22.000 soldatoj ripozantaj en la germana tombejo.**

multaj familianoj de la 22.000 germanaj soldatoj ripozantaj en la germana « Soldatenfriedhof » de mia vilaĝo.

Bedaŭrinde aliaj spertaj kaj malnovaj esperantistoj ne akceptis la taskon. Tial mi akceptis por tri jaroj la seriozan kaj malfacilan taskon de redaktoro. Sed mi fidas je la helpo de ĉiuj IKUE-anoj. Kiel diris la Prezidanto, la redaktado de nia revuo estas komuna interesiĝo de ciuj.

Do ni atendas viajn raportojn pri via agado, viajn sugestojn, proponojn, dezirojn... Tial nia revuo pliriĉiĝos kaj plibeliĝos, estos interesanta ligilo inter la katolikaj esperantistoj, fidela spegulo de la vivo de IKUE. Oni ne fermos la revuon, kiel iuj timas, al seriozaj progresemaj tendencoj, sed certe ĝi estos tre fidela al la katolika fido, al la instruado de la S. Seĝo kaj de la episkoparo.

Bedaŭrinde oni devos kelkfoje prokrasti la publikigon de via materialo aŭ elpreni nur parton de via sendaĵo, t.e. la plej interesan parton.

Memkompreneble ne estas eble kontentigi ĉiujn, sed ni faros ĉion eblan por kontentigi aprobindajn dezirojn.

Ne sendu al mi monon, ĉar mia tasko estas nur redakcii.

Ni sendis la unuajn kajerojn de la « nova » E.K. al 1600 adresoj kaj nun atendas la rezultojn kun granda espero.

Mi salutas vin tutkore. Dio benu nin ĉiujn kaj nian agadon por la disvastigo de la kristanaj ideoj.

Pastro FELICE RUARO
Costermano - Verona (Italujo)

---

## EKUMENAJ INFORMOJ

GRANDA EVENTO POR LA EKLEZIO estas la Roma Sinodo, por kiu ĉiuj katolikoj estas invitataj al preĝado. Niaflanke ni invitas al tio la katolikajn esperantistojn La Sinodo komenciĝis la 30-an de septembro kaj daŭros verŝajne la tutan oktobran monaton. Du ĉefaj estas la temoj pritraktendaj: pastreca vivo, kaj justeco en la mondo. La Sinodo estas institucio kreita de la freŝdata koncilo; kunveno, kiu ripetiĝas ĉiun duan jaron, kolektanta reprezentantojn de la tutmonda episkoparo: preskaŭ 200. La plej parto el ili estas elektita per la episkopa konferenco de ĉiu lando de la tero; krome partoprenas en ĝi prezidantoj de la administraj fakoj de la eklezio, spertistoj, delegitoj de religiuloj, kelkaj sacerdotoj proponitaj de la episkopaj konferencoj, kaj kelkaj laikoj, inter kiuj du virinoj.

LA KONGREGACIO POR EVANGELIZADO devas zorgi por subteni en misilandoj, krom misiistoj, fratinoj, kaj diversaj iniciatoj, ankaŭ porkatekistajn entreprenojn kaj porpastrajn seminariojn. En la Afrikaj misilandoj dependaj de la Roma « Propaganda Fide », troviĝas 70.000 katekistoj; 60.000 en Azio, el kiuj 50.000 en Hindujo, kaj 3.500 en Oceanio. En 1970 la petoj por helpo al la katekista entrepreno estis la duoblo de la antaŭa jaro: 231 petoj el Afriko, 161 el Azio, 17 el Oceanio, 30 el la Latina Ameriko. Sed la fonduso disponebla: 3.300.000 da dolaroj, sufiĉis nur por malpli ol la duono. Necesas fakte multaj elspezoj pro studokursoj, lernejoj kaj loĝejoj, por la laboro, ktp. En simila situacio troviĝas la entrepreno por la misiaj seminarioj, kiuj zorgas por 3.811 lernantoj en la ele-

mentaj klasoj, 22.853 en la mezgradaj, 17.075 en la gimnaziaj, 5.000 studentoj en la filozofiaj kursoj kaj 3.265 en la teologiaj. En 1970 sacerdotiĝis 560 junuloj en la diversaj misioj, krom 52 en la instituto S. Petro Apostolo en Romo. Ĉi tiuj nombroj ne rilatas la teritoriojn de Aŭstralio kaj Novzelando, kvankam dependaj de la Kongregacio por Evangelizado, kaj la religiajn seminariojn.

LA 3-an DE SEPTEMBRO LA PAPO forlasis sian someran restadejon por viziti du klaŭzurajn monakinejojn kaj parokon de Albano. La unua reliĝia domo de li vizitita apartenas al la Bazilianaj fratinoj ekde 1845, kiam kelkaj monakinoj sukcesis eskapi el la Litvana persekutado. La fratinoj salutis la papon per ukrajna kanto. Kaj la papo havis oportunan temon por sia alparolado al ili, el la fakto, ke ili sekvas la spiritan vivmanieron de S. Bazilio la Granda, kiu havis notindan influon en la orienta tradicio, kvankam la fondo de la ordeno devenas de la pola martiro S. Josafato. Tiel la papo parolis pri la eklezia aspiro, ke katolikoj kaj ortodoksuloj sukcesu reveni al unueco de kredo kaj de amo, respektante tamen la diversecon de la ritoj kaj de la spirita sento. La papo memorigis ankaŭ, ke la relikvoj de S. Josafato, unue konfiditaj de li mem, kiam li estis Ŝtata sekretario, al la franciskaninoj, poste, zorge de kard. Slipyi, estis donitaj al la baziliko S. Petro. Parolante al la dua monakinejo, kie vivas klaraninoj, la papo aldonis novajn vortojn pri la neceso de la penta kaj preĝa vivo por la eklezio, kiu volas esti malriĉa, preĝanta kaj pentofara. Fine, parolante al la parokanoj de la preĝejo « Senmakula Koro de Maria », la papo diris, ke tiu preĝejo, de mallonge inaŭgurita, memorigas, ke tio ne signifas, ke oni jam konstruis la eklezion, ĉar ĉi tio apartenas al la frateco, al la komunuma spirito de ĉiuj parokanoj, unuiĝe kun la parokestro, kaj per li kun la eklezia jerarkio.

LA REPREZENTANTOJ DE SEP MIL gereliĝiuloj, kiuj laboras en Ĉilio, dum la ĉijara kuna asembleo, decidis revizii funde la reliĝian vivmanieron en la nuna socio marŝanta al socialismo. Oni aparte proponis: La reliĝiaj komunumoj forlasos laŭgrade ĉiujn posedaĵojn, kiuj ne estas rekte kunligitaj kun la apostolado aŭ aliaj agadoj (domoj, bienoj, akcioj); ĉiu reliĝiulo devas perlabori sian vivon per sia apostolado aŭ per alia pagita aktiveco. Kaj ĉiuj reliĝiuloj de la ĉilia eklezio ĝuos pri la socia protekto la samajn rajtojn de ĉiu enlanda lo ĝanto.

EPISKOPA KONFERENCO EN LIMO kuniĝis fine de aŭgusto por prepari la partoprenon de la Peruaj episkopoj al la Roma Sinodo, pridiskutante la du ĉefajn proponitajn temojn. Rilate al la pastreca vivo ili rekonfirmis la valoron de la sacerdota celibato; sed petas rajton ordini ankaŭ virojn jam edziĝintajn. La peruaj episkopoj aldonis, ke konstruo de pli justa socio en la latina Ameriko signifas liberigi la kontinentajn popolojn de materia kaj spirita mizero kaj de la premo, kiun ĝi alportas. La evangelio — asertas la peruaj episkopoj — inspiras preferon al malriĉuloj, forlasitoj, subpremitoj. La episkopoj kunvenintaj en Limon insistis, ke la pastro priatentu problemojn kaj aspirojn de siaj membroj kaj aparte da le plej senhelpaj. Pro tio la Perua episkoparo petos de la Sinodo, ke la pastro rajtu, se necese, ekzerci profesion aŭ manlaboron.

LA UNUA KATOLIKA INTERAMERIKA kongreso por la tuta homa progreso, kunveninta en Karakaso, Venezuelo, denuncis la sociajn kaj ekonomiajn maljustaĵojn, pri kiuj estas viktimoj laboristoj kaj kamparanoj, kaj sin deklaris favora al renovigo de la ekonomiaj kaj sociaj strukturoj de la Latin-Amerika kontinento. La kongresanoj rekomendis al kristanoj luktadi por la agrara reformo, kiu ne limiĝu transdoni bienon al kampuloj, sed havigu al ili ankaŭ teknikan kaj financan helpon. Krome la kongreso incitis al la plej granda strebo cele al la progresanta industriiĝa terkulturo kaj al kreo de kooperativoj, kiu servu al la socia liberigo, donante samtempe pli striktan homan solidarecon. Kaj ĝi solene pledis por la respekto de la indiĝena laborista

# DIO KAJ LA UNIVERSO

*La poeto Alphonse Lamartine skribis:*

La universo estas la templo, la tero estas l'altaro, la ĉielo estas ĝies kupolo kaj tiuj sennombraj steloj, tiuj duonkovritaj fajroj, pala ornamo de la ombro, estas la sanktaj torĉoj lumigitaj por tiu templo. Kaj tiuj nuboj, kiujn la subiranta suno koloriĝas kaj venteto milde blovanta puŝas je purpuraj flokoj al la marĝenoj de la horizonto, estas la incenso supreniranta al la trono de Dio, kiun la naturo adoras. Sed tiu templo estas sen voĉo. Kie estas la sanktaj koncertoj? El kie leviĝas la himno de la universo? ĉio silentas.

Nur mia koro parolas en tiu silento. La voĉo de la universo estas mia menso: sur la sunaj radioj, sur la ventaj flugiloj ĝi leviĝas kiel vivanta parfumo kaj, donante voĉon al ĉiu estaĵo, donos mian animon al la naturo por adori la Kreinton. Nur alvokante lian patran rigardon mi pleniĝas la dezerton per la dia nomo kaj tiu, kiu el sia grandega gloro aŭskultas la harmonion de la ĉielaj sferoj, aŭskultas ankaŭ mian humilan voĉon.

*La itala scienculo Prof. Enrico Medi skribis:*

El la luno oni vidas ĉielon mirinde plenan de steloj kaj de miliardoj da brilantaj galaksioj. La paŝo farita estas nenio kompare kun la miliardoj da lumjaroj, kiuj disigas nin de la mondaj limoj: sed el la luno oni vidas la plej belan spektaklon de la kreaĵo, oni vidas la teron, mirindan postsignon de Tiu, kiu movas ĉion.

Dum la franca revolucio diris ateisto al tre religiema kamparano:

« Ni destruos viajn preĝejojn kaj viajn sonorilejojn ».

La kamparano respondis: « Estas eble, ke vi faros tion, sed vi ne povos detrui la stelojn; ĝis tiu mirinda alfabeto estos sur nia kapo, niaj gefiloj povos lerni la sanktan nomon de Dio ».

## LA LEGANTOJ SKRIBAS

### Ulrich Hoffman el Berlino:

Okaze de via IKUE-prezidanteco kaj okaze de nova etapo, kiu sendube komencis ankaŭ por ESPERO KATOLIKA, mi deziras esprimi por vi persone, por via funkcio en IKUE kaj por via gvida kunlaboro ĉe ESPERO KATOLIKA plenan la Dian benon.

Estas taŭga momento denove, kaj laŭeble pli intense ol antaŭe, pripensi la estontan vojon de niaj unuiĝo kaj de nia revuo. Vi mem ja donis la dankindan instigon en via programo publikigita en la n-ro 617 de « EK ».

Vere kaj ĝuste vi postulas ke EK estu « la fidela speguli de nia movado ». Sed ĝi nur povas esti tia, kiam la « movado » fakte estas io, kio « movas », « movadas » do finfine « vivas ». Stagnado en tiu senco jam ne plu estas « vivo » laŭ mia opinio.

Iel ni verŝajne devos majstri similajn problemojn tiurilate kiel la ĝenerala Esperanto-movado. Ilin trafe skizis D-ro W. Bormann en siaj « dek tezoj », kiujn vi sendube ankaŭ jam legis en HEROLDO DE ESPERANTO n-ro 10 (1509) 10 julio 1971.

Mi pensas do ke nia revuo diferenciĝu inter ĉiuj aliaj naciaj, landaj katolikaj semajnaj aŭ monataj gazetoj, revuoj k.t.p. alimaniere ol sole nur per tio ke nia revuo tekstas en Esperanto. Certe, tiujn temojn, kiujn vi nomas « ĉefaj » mi ankaŭ taksas « gravaj ». Ili havu sian regulan kaj necesan lokon en la revuo, sed mi petas ne tiel ke leganto povus sopiri tion-ci mi ĉion ja legas en mia urba aŭ provinca aŭ landa eklezia gazeto (kaj je pli frua eldon-tempo), pro kio mi do bezonas la Internacian Lingvon?

Bonvole ne ekmiskomprenu min: mi nur volas konsideri kaj konsiderigi la taŭgan proporcion inter la diversspecaj enhavoj.

Ĝis la brila tempo, kiam Esperanto estos mondvaste « memkomprenebla kaj ĉiutaga afero almenaŭ en ĉiuj internaciaj rilatoj », la plej gravaj « ĉefaj » taskoj — pro la ekzist-rajto de niaj organizaĵo kaj revuo — devus esti miaopinie

a) la disvastigado de la Internacia Lingvo en la katolika mondo,

b) la informado de la ne-esperantista katolika mondo pri ni.

Se ni ne sukcesas mem « esperantistigi » en niaj katolikaj rondoj, tiam ni fakte devas esperi je tio ke la ĝenerala Esperanto movado pli sukcese laboru kaj « en nian sinon falu tiujn novajn adeptojn de Esperanto, kiuj hazarde estas katolikoj ». Tio ŝajnas al mi nek kontentiga, nek inda por nia afero.

Mi nur povas kaj ankaŭ per tiu ĉi letero nur volas doni instigojn pri ebla « pli-vivigado » de niaj unuiĝo kaj revuo:

— Ankaŭ pri la aliaj estraranoj aperu mallongaj (eble aŭtobiografioj).

— Laŭvice la landaj reprezentantoj de IKUE donu raportojn por la legantoj pri

a) si mem,

b) sia lando kaj la enloĝantaro (tre mallonge, kvazaŭ leksikonstile),

c) katolika Esperantomovado (se ekzistas) aŭ unuopaj aktivecoj,

d) perspektivoj de « esperantistiga

aktiveco » en sia respektiva lando,

e) proponoj kiel eble katolikaj samideanoj povus helpi.

— Ekaperu « anguleto », kiu peras personan (korespondan) kontakton por « kun-labor-emaj » samideanoj.

— IKUE-anoj, kiuj partoprenas internaciajn, ne-esperantistajn, katolikajn kongresojn k.t.p. havu la eblecon pri tio informi en EK por ke eble renkonto kun ankaŭ tie partoprenanta samideano povus esti organizota.

— Serioza kaj racia sed ĉiama alskribado al Radio Vaticano petante elsendojn en la Internacia Lngvo aŭ simple skribi en Esperanto demandojn pri programeroj k.t.p.

— Skribi al lokaj katolikaj gazetoj aŭ revuoj tradukante interesaĵojn el EK.

— Raporti al EK pri personaj spertoj de lingvaj malfaciloj kun eksterlandaj katolikoj k.t.p. Tiuj raportoj povus esti taŭge eluzitaj per la legantoj en iliaj rondoj kaj lokoj.

— Kuraĝigo de la legantoj de EK mem fari proponojn.

Kial do nutempe IKUE? Unuavice ĉiam ankoraŭ laŭ mia penso por « esperantistigi » la katolikajn unuopulojn, grupojn k.t.p., kaj por tio estas logika nepra antaŭkondiĉo ke la jam ekzistantaj katolikoj-esperantistoj unuiĝu en kunlaborada movado por atingi per harmonia cel-trafa komuna forto la progreson de Esperanto en la internacia katolika mondo.

Mi tute ne petendas esti skizinta la plej bonan « solvon » de niaj problemoj, sed jam diskutado sobra, senpolemika estos certe iamaniere « progreso », ĉu ne?

Kun multaj afablaj salutoj el Berlino sincere via

**Ulrich Offman**

## Nikolas Hoen el Heerlen (NL):

**Publika alvoko al niaj amikoj en Ceĥoslovakujo, Hispanujo, Italujo kaj Polujo.**

Karaj amikoj,

Laŭ la protokola raporto de s-ano K. Dürrschmid en « Espero Katolika » de aprilo-majo venis precipe el viaj landoj la plendoj pri la E.K. el la periodo Maul/Tuinder kaj la eksiĝoj kiel membroj de IKUE.

Vi nun havas laŭ mi la moralan devon apogi ĉiumaniere nian novan Prezidanton, Pastron Longoni, ĉar Vi ĉiuj mem liberigis la vojon por li al restarigo de IKUE kaj EK en kiu denove la kristana amo kaj vere-kristanaj valoroj direktos la agadon.

IKUE — kaj EK kiel ĝis spegulo — denove fariĝu ripozdonaj kaj firmaj rokoj sur kiuj ambaŭ trovu la fundon al nova evoluiĝo kaj ekfloro, forlasante ĉiujn disigajn kaj memdetruajn elementojn por nia internacia katolika Esperanto-movado.

Tiukondiĉe nova estonto kaj refortiĝo certe estos eblaj. Sed alia kondiĉo estas ankaŭ ke Vi ĉiuj, kiuj en timo forlasis niajn rangojn, revenu, revenu baldaŭ eĉ, denove fariĝu, denove membroj de IKUE kaj subtenantoj de EK, kiun Vi, en via koro, kiel mi, sendube ne povis forgesi.

Revenu do amase, reabonu EK, sendu (iel) vian direktan financan subtenon, kreu por la nova Prezidanto kaj Estraro — plue forgesante ĉiujn amarajn sentojn el la pasinta periodo — firman financan kaj materialan bazon por nova komenco, por pli digna kaj pli kristana intersinteno.

## S-ro J. A. Tuinder:

Kara pastro Longoni,

kun granda danko mi ricevis vian poŝtkarton. El ĝi mi bone komprenas, kiom grandaj estas la malfacilaĵoj ĉirkaŭ la redaktado de nia kara « Espero Katolika ». Por mi kaj des pli por Stef Maul la tuta afero estas tre dolora kaj malĝojiga. Kaj certe ankaŭ vi havos sendormajn noktojn.

Pastro Flammer skribis al mi, ke li estas preta helpi al nia organo, do kial ne danke akcepti lian valoran kontribuon? La redakcio de E.K. devas esti konscia pri tio, ke **flanke de la legantoj** iu pozitiva helpo **en la formo de artikoloj** estos minimuma. Estas fakto malvarmiga, sed ne malpli nuda fakto!

## Rudolfo kaj Irene Skorupa el Stockheim (Germanujo):

Vi surprizegis nin per la sciigo ke vi fariĝis redaktoro de EK.

Nian sinceran gratulon! Ni ĉiuj ĝojas, ke la fatala tempo en la historio de IKUE pere de la novelektita prezidanto kaj nepra ŝanĝo de la redaktoro de EK finiĝis. Por ni persone la antaŭa tempo estis doloriga, ĉar mi konas persone multajn membrojn subite lumigitajn pri la ĝusta vojo de Eklezio kaj IKUE.

---

## Agado « Okulon pro okulo »

# ESPERANTISTOJ ESPERIGAS ESPERANTOJN

Post kelkmonata ripozo, dum kiu periodoli ricevis ankoraŭ kelke da reagoj flanke de esperantistoj, la iniciatinto de « Agado E3 » deziras informi la membrojn de I.K.U.E. pri la nuna stato de la afero. Estas fakto jam ĝenerale konata, ke la financa helpo de la esperantistoj kaj neesperantistoj estis tiom granda, ke ĝi ebligis veturigi du surradajn okulklinikojn: unu en Kenjo, la alian en Malavio. Kia estas la stato en Kenjo?

La 31-a de oktobro 1970 estis grava tago por la blinduloj en Kenjo. En tiu tago du reprezentantoj de la Institucio Prof. D-ro H. J. M. Weve (P. W. F.), Prof. G. H. L. Zeegers kaj D-ro A.A.T.T. van der Eerden, vizitis tiun landon por malfermi intertraktadojn kun la kompetentaj aŭtoritatoj kaj organizaĵoj. La celo estis starigi helpprogramon favore al la multego da blinduloj. La unuaj preparaj kontaktoj okazis antaŭ proksimume du jaroj.

P.W.F. - Prof. Weve estis oftalmologo kun internacia reputacio - estis fondata antaŭ sep jaroj por doni kontribuon al la solvo de la blindeco en evolulandoj, unualoke de la nenecesa blindeco. Por la venontaj jaroj P.W.F. deziras emfazi la okulkuracan zorgon. Tial la nederlanda okulisto D-ro Van der Eerden vizitis Kenjon por priparoli formojn de kunlaborado. Oni deziras realigi en la Okcidenta Provinco (popolo dumiliona tute sen medicina zorgo pri okulpacientoj) OKULKURACAN CENTRON

en la malsanulejo de Mukumu, kie oftalmologie estos instruataj kuracistoj, medicinaj asistantoj kaj flegistinoj. Apude de ĉi tiu iniciato oni intencas establi Okulklinikon kun 20 litoj kaj veturigi surradan klinikon (Zamenhof Okul-kliniko I) por la disaj pacientoj.

P.W.F. havas malvastan rilaton kun S-ro Amiami, tre sperta medicina asistanto, D-ro Bisley, gubernia oftalmologo, kaj D-ro Burkitt, oftalmologo de la Kenia Porblindula Societo en la Nianza Provinco (Kisumu). La malsanulejo estos la bazo por ĉiuj helpiniciatoj en la tuta regiono. Ĝojige estas, ke nun funkcias ankaŭ dua surrada kliniko, donaco de « Lion » - kluboj en Nederlando en Kenjo.

La okulkuracan laboron en la Mukumu-Centro de P.W.F. ĉefe faros teamo de tre spertaj okulistoj el Nederlando - kaj poste eble ankaŭ el aliaj landoj, se anoncos sin taŭgaj kandidatoj'.. kiuj laboras parte en Kenjo kaj parte en sia patrujo. En la pasinteco P.W.F. elsendis la okulistojn D-ron Galema kaj D-ron Weitz. La lasta aldoniĝis al la teamo.

P.W.F. deziras intime kunlabori kun la Kenja Porblindula Societo, ĉar ĝi havas multe da sperto sur ĉi tiu kampo kaj ankaŭ ĉar la gubernia registaro oficiale rekonis ĝin. La Societo havas kvar funkciantajn veturantajn okul-klinikojn (Meri, Eldoret, Maĥakos kaj Nianza) sub la gvido de D-ro Burkitt kaj risvolvas kelke da aliaj medicinaj kaj social-edukaj aktivaĵoj por la blinduloj en Kenjo. Ekzistas kontaktoj ankaŭ kun la « Fluganta Servo de Kuracistoj » (Flying Doctor's Service), tiel ke la malsanulejo de Mukumu povas utiligi ĝiajn vastajn servojn.

P.W.F. deziras membriĝi ankaŭ al la « Komitato por Preventado de Blindeco » en Kenjo. Ĉar ĝi, depost la komenco dediĉas ĉiun atenton al la preventado de blindeco, la institucio kontaktis la Centron de Medicina Esploro de la « Reĝa Tropika Instituto » de Amsterdamo en Najrobi.

La CAROSI-institucio, funkcianta en Kenjo, nomiĝas do « Professor Weve Foundation », kaj sub tiu ĝi estas oficiale registrita. Ĝia prezidanto estas Prof. George H. L. Zeegers kaj ĝia sekretario D-ro A.A.T.T. van der Eerden. La Kenja Porblindula Societo estas prezentita en la estraro en la persono de S-ro Alex Mackay.

La 12-an de novembro 1970 okazis cerimonia kunsido, kiun ĉeestis i. a. la Nederlanda ambasadoro kaj dum kiu oficiale instaliĝis la komitato de P.W.F. en Kenjo.

**Jacques Tuinder**

---

## « NI GRATULAS »

Stefano kaj Irene Miller (Bavario) anoncas la naskiĝon de Fabiola, kiu estas la tria filino. Patro kaj patrino estas ambaŭ fervoraj esperantistoj. EK gratulas tutkore.

* * *

ANONCETO

Ni sendos ankoraŭ la revuon EK al ĉiuj IKUE-anoj. Venontjare ni ne povos sendi ĝin al tiuj kiuj ne estos pagintaj la abonkotizon por la nova jaro. Bonvolu sendi baldaŭe vian kotizon.

## LANDAJ REPREZENTANTOJ

| | | |
|---|---|---|
| Anglujo | - | S-ro N. W. Vigar, 28 Franklands Drive, Addlestone - Surrey |
| Aŭstralio | - | S-ro V. J. Timmins, 73 Alexandria Parade, Hornaby N. S. W. |
| Aŭstrujo | - | S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, A-1030 WIEN III, p. k. 105.713 |
| Belgujo | - | S-ro E. Paesmans, L. Koeportstraat 64, Antwerpen, telef. 321751 p. k. 41 45 89 |
| Brazilo | - | B. E. L. Praça da Republica 54, 1 e, Rio de Janeiro |
| Ĉeĥoslovakio | - | S-ro Ales Berka, Na haràzi 1423, Vsetìn |
| Francujo | - | S-ro Gaston Véron, Place de la pttite Bruyère, Donfront (Orne) poŝtkonto: G. Véron, CCP Rouen 1188-63 Z |
| Germanujo | - | S-ro Gerhard Vogel, Tondernstrasse 36, D-5 Köln 30 poŝt—. Köln 166355 |
| Hispanujo | - | S-ro Miguel Martinez, Av.da San José 105, pral. Zaragoza |
| Irlando | - | S-ro P. J. O' Reilly, « Woodbine », Bluebell, Dublin 12 |
| Italujo | - | S-ro C. C. Ferrari, viale dei Mille 37, I-20129 Milano 1 telef. 267.895; poŝt—onto 3-7791 |
| Japanujo | - | S-ro prof. Eiiti Minami, Nakano-5-chome, 26-36 Nakano-ku, TOKIO |
| Jugoslavio | - | P. Felix Stricki, Hadzi Melentija 75, Beograd |
| Kanado | - | S-ino Pauline Proulx, 790-80 e rue Est, Charlesbourg, Québec |
| Kolombio | - | P. Luis E. Palacios Toral, Apartado Aéreo 12-03, Cartagena |
| Koreo | - | S-ro Paul Kiseng Kim, I. P. O. Box 2752, Seoul |
| Madagaskaro | - | s-ro Ramanantsoa Claude Dominique Gérard Cité Ambohipo 469 Tananarive |
| Nederlando | - | S-ro S. P. Smits; Kloosstraat 55, Zoeterneer, pk. 685124 |
| Polujo | - | Pola Katolika Unuiĝo Esperantista, Zabrze, skr. pt. 68 |
| Portugalujo | - | S-ro M. M. Lourenĉo Gouveio, Caixa Postal 456, Funchal-Madeira |
| Svislando | - | p. W. Flammer, C. 9106 Zürchermühle, Urnäsch AR |
| Urugvajo | - | D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Flor) |
| Usono | - | S-ro H. S. Corlett, 7605 Winova Lane, Sebastopol, California 95472 |